# *Prezidento de Kubo elvokas Nelson Mandela post sia alveno en Sudafriko*



**Foto: @DiazCanelB**

Havano, a?g 23 (RHK) Ni jam estas en la patrujo de la kara amiko Nelson Mandela, skribis ?i-mardon en sia Iksa konto, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo, Miguel Díaz-Canel, prezidento de la Respubliko, post alveno al Sudafriko.

En sia mesa?o, la ?tatestro memorigis, ke ?efkomandanto Fidel Castro Ruz (1926-2016) priskribis Mandela kiel brilan kaj eksterordinaran gvidanton, simbolon de libereco por Afriko kaj la mondo.

La prezidento memorigis anka? la sentojn de frateco kaj solidareco, kiuj inspiras rilatojn inter Sud-Afriko kaj la plej granda insulo de Antiloj.

> “Ni estas jam en la patrujo de la "brila kaj eksterordinara gvidanto, (...) simbolo de la libereco de Afriko kaj de la mondo", kiel Fidel priskribis sian karan amikon Nelson Mandela.
> Sentoj de frateco kaj solidareco inspiras rilatojn inter #Kubo kaj #Sudafriko.
> pic.twitter.com/ADPKoXFTbe
> — Miguel Díaz-Canel Bermúdez (@DiazCanelB) la 22-an de a?gusto 2023

Díaz-Canel alvenis al Sud-Afriko marde el Angolo, kie li faris oficialan viziton ekde diman?o ?e la kapo de delegacio de sia lando.

Akompanas la eminentulon Bruno Rodríguez, ministro pri eksteraj rilatoj; José Ángel Portal Miranda, estro de Publika Sano, kaj Emilio Lozada, estro de la Departemento pri Internaciaj Rilatoj de la Centra Komitato de la PCC, inter aliaj oficistoj.

La kuba prezidento ?eestas al la Pintkunveno de Brics (Brazilo, Rusio, Barato, ?inio kaj Sud-Afriko) en la urbo Johanesburgo, reprezentante la Grupon de 77 kaj ?inio, organizo de kiu Kubo estas pro tempore prezidanto.

Díaz-Canel estas en turneo de pluraj afrikaj landoj, en kiuj li anka? vizitos Mozambikon kaj Namibion.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/332108-prezidento-de-kubo-elvokas-nelson-mandela-post-sia-alveno-en-sudafriko

Radio Habana Cuba